

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjariĝo de Ruĝa Kruco.

Dum februara elsendo mi anoncis, ke tiun ĉi someron Ruĝa Kruco festos en Ĝenevo sian centan naskiĝaron per grava internacia kongreso.

Ruĝa Kruco tre verŝajne estas la plej populara internacia organizaĵo, tio ne nur dank'al sia granda aĝo, sed al la efiko de sia agado. Ĝia aktiveco baziĝas sur la kunlaboro de miloj kaj miloj da sindonaj simplaj homoj en la tuta mondo. Jen la sekreto de ĝia sukceso.

Ruĝa Kruco reprezentas en la mondo la volon de la popoloj kontraŭ tiu de la registaroj. Ĝi diras : « *Pacon kaj homan dignon* » al tiuj, kiuj antaŭ ĉio tro facile vidas nur perforton kaj nacian superecon. Ĝia historio devus esti pli konata kaj instruata en la lernejoj, ĉar ĝi estas grandparte la historio de la homaro, kiu malkovras sian homecon.

Se unu movado estas parenca al nia esperanta movado, tio estas Ruĝa Kruco. En la koncerto de la hodiaŭaj mondorganizaĵoj Ruĝa Kruco kaj nia movado estas verŝajne tiuj, kiuj plej intime respegulas la sopiron de la homoj al pli homeca vivo. Tiu sopiro ne nur esprimiĝas per paroloj, sed per kuraĝaj agoj : flegado de malfeliĉuloj kaj defendo de la rajtoj de minacataj loĝantaroj, disvastigado kaj praktikado de kulturilo neŭtrale homa. Ambaŭ movadoj lokigas la homon super ĉio ajn : ĉu idealo, ĉu eĉ nur idolo. De tio devenas ilia nealtigebla dinamismo, kiu kapablas entuziasmigi popolamasojn.

Mi parolos dum pluraj elsendoj pri la historio de Ruĝa Kruco, tio ne nur ĉar tiu organizaĵo naskiĝis en Svislando kaj ĉar ĝi estas forte ligita al la moderna historio kaj politiko de nia lando, sed ĉar samtempe ĝi estas unu el la perloj de la homaranismo.

Interesa libro titolita « *La Croix-Rouge internationale* » (La Ruĝa Kruco internacia) eldonita pasintjare de la pariza firmao « Presses universitaires de France » donas sciigojn pri la disvolviĝo de Ruĝa Kruco. Mi konsilas la legadon de tiu verko al la franclingvanoj, kiuj havas intereson pri historio kaj internacia vivo. El tiu libro mi ĉefe elpruntos informojn koncerne, ni diru, la prahistorion de la movado, kiun iniciatis Henry Dunant. Henri Coursier, la aŭtoro de la ĵus menciita libro, komencas sian verkon per vortoj pripensigaj, kiujn mi traduke citas al vi :

« *Reĝa moŝto, kiel trakti malamikajn vunditojn ?* » - « *Sed kiel la niajn, respondis la reĝo, ĉar pro la fakto, ke ili estas vunditaj, ili ne plu estas niaj malamikoj.* » La aŭtoro aldonas : « *Tiu respondo de Ludoviko la dekkvina sur la batalkampo Fontenoy sufiĉe bone karakterizas la evoluon de la ideoj, kiu de pli ol unu jarcento celadis humanigi la militadon.* » (Fino de la citaĵo.)

Oni povas sin demandi, se depost la regno de la franca reĝo, do depost la dekkoka jarcento la ideoj tiurilate multe evoluis. Mi timas, ke meze de la dudeka jarcento multaj ŝtatestroj ankoraŭ celadas humanigi nehumanigeblaĵon anstataŭ konsideri la militadon kiel forigendan malsanon. Ilia moralo similas tiun de la dekokjarcenta reĝo, ĉar por ili la nacio staras super la homo. Tiu moralo senĉese naskas internaciajn konfliktojn, ĉar ĉiu nacio konsideras sin mem kiel plej altan idealon. Homoj loĝantaj en aliaj nacioj reprezentas por naciisto latentan danĝeron, ĉar ili ne kredas je la sama absoluto. Tiu filozofio necese kondukas konsideri eksterlandanojn kiel malamikojn, kaj ilin mortigi povas fariĝi devo.

Ruĝa Kruco estas konstruita sur alia moralo. Por ĝi la homo staras super la nacioj. La homa digno estas pli grava, ol la diversaj dignoj. Henry Dunant en Solferino nur vidis teruran katastrofon, kiu dum unu sola tago neniigis la esperon de centmiloj da homoj kaj nenion solvis. Li sentis sin respondeca kaj provis savi de preskaŭ certa morto vunditojn sen zorgo pri ilia nacieco, kredo aŭ rango. Por li tiuj vunditoj ne estis francoj, sardoj, aŭstroj aŭ hungaroj,

sed homoj. Ruĝa Kruco naskiĝis sur batalkampo kiel tria batalanto. Tiu esprimo estas la titolo de la libro de Marcel Junod « *Le troisième combattant* », eldonejo Payot, 1962. Ruĝa Kruco estas tria batalanto, sed batalanto por la paco.

Per sia laboro Ruĝa Kruco iom post iom kvietigas la spiritojn. Tio estas necesa preparo por la kvietigo de la konfliktoj. En mondo, kiu servas la perforton, ĝi konstante admonas la homojn forlasi tiun servuton, kiu nur kondukas la homaron al katastrofoj, por iam sekvi la vojon de la amo.

Antaŭ 2500 jaroj la ĉino Laoceo donis instruon, kiun ni hodiaŭ povus kontroli studante la historion. Li diris :

*« La morto jam okupiĝas mortigi homojn. Voli plenumi ĝian taskon anstataŭ ĝi, tio estas preni la lokon de la ĉarpentisto por manipuli lian ilon. Kiu sin riskas al tia laboro, tiu havas ŝancon, se li ne tranĉas la propran manon. »*

Mi havas la impreson, ke konstante ni volas preni la lokon de la ĉarpentisto, kaj ke konstante ni tranĉas la propran manon.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-